



ESPÉRANTO-NORD

Fédération d'espéranto des régions Nord-Pas-de-Calais & Picardie

PROTOKOLO DE KUNSIDO DE LA FEDERACIA KOMITATO

Sabaton la 14an de Novembro 2015 je la 10:30 kunsidis la Federacia komitato de la Nordfrancia Esperanto-Asocio en Stella-Maris.

Ĉeestis: Katja Boen, sekretariino; Michel Dechy, prezidanto; Cyrille Decouture; Thérèse Dequidt; Xavier Dewidehem; Catherine Lévêque; Claude Longue-Épée; Arlette Plutniak; Edmond Plutniak; Xavier Vilain, kasisto.

Senkulpiĝis: Jean Dietrich; Joëlle Muller; Jacky Ramon; France Valet; Richard Valet.

Ĉeestis ankaŭ Didier Touller, prezidanto de Arras-Espéranto kaj Didje, sekretario de Boulogne Espéranto.

Tagordo:

1) UK en Lille en 2015.

2) Stella Maris en 2015.

3) Stato de niaj kluboj (membroj, kursoj - spertoj pri la uzado de NAP en la lernejoj -, agadoj...)

4) Ĉu nova kasisto por la Norda Federacio?

5) Jara kunveno de la N.F. en 2016.

6) Diversaj informoj aŭ demandoj...

Pro la ĵus okazintaj atencoj en Parizo, nia kunveno komenciĝas per unuminuta silenta omaĝo al la viktimoj.

1. UK en Lille en 2015.

Xavier Dewidehem informas pri la UK: ĝi estis la plej populara el la nuna jarcento, kun 2700 kongresanoj el 80 landoj. Ĝi estis ankaŭ bela publika sukceso (afiŝoj en la urbo, ĵurnaloj, radiatoraportoj...) kun bunta publika programo (surstrataj spektakloj, futbalmatĉo, parado en Bulonjo-ĉe-maro, kursoj en kongresejo -ili trifoje okazis-, kaj 130 homoj eklernis Esperanton. Esperantistoj el la tuta mondo ŝatis la varmecon de la akcepto fare de la norduloj, la malfermitecon de la UK... X.D. dankas ĉiujn kontribuintojn. Ni faris paŝon antaŭen por modernigi la UKojn.

Edmond Plutniak parolas pri la ŝildo pri Gaston Waringhien sur la fasado de la kafejo *L'avant-scène*. Okazis bela ceremonio por inaŭguri la ŝildon. E.P. klopodas por ke la liceo Faidherbe akceptu la librojn de Waringhien, por ke la studentoj vidu ilin. Waringhien instruis dum 25 jaroj en la liceo Faidherbe (Claude Longue-Épée aldonas ke Gaston Waringhien instruis en la malnova liceo Faidherbe, la nuna liceo

Faidherbe situas aliloke). Estas projekto meti ŝildon pri Waringhien en la medioteko de la liceo. Ĉiuj komitatoj konsentas pri la projekto. La federacio pagos tiun novan ŝildon.

Michel Dechy parolas pri la infana kongreso. La kosto por la gepatroj estis malgranda ĉar la urbo Villeneuve d'Ascq multe helpis.

2. Stella-Maris

67 homoj el 7 landoj aliĝis. Antaŭ unu monato estis nur 30 aliĝintoj (la malfruaj aliĝoj malhelpas la taskon de la organizantoj!). Pro la atencoj en Parizo rezignis du personoj.

Nia renkontiĝo celas altigi la lingvan nivelon, kaj montri la kulturen aspekton de Esperanto. Prepari la renkontiĝon estas grandega laboro kaj Arlette kaj Edmond Plutniak sin demandas ĉu tiu aranĝo ankoraŭ interesas junulojn. Ili lastfoje organizas tiun aranĝon. Ekestas debato pri la aranĝo, kion fari por anstataŭigi ĝin, kion eblas fari... Ĉiuj vere deziras ke la aranĝo plu okazu, sed neniu sin proponas por respondi pri ĝi.

Xavier Vilain parolas pri organizo de io en Lillo (ĉu en MRES?), eble nur dum unu tago, kiel niaj federaciaj kongresoj, sed kun alia enhavo, kun pli ampleksa distra programo. Didier Touller sin demandas ĉu ni havas sufiĉe da fortoj por dufoje organizi ion.

M.D. parolas pri la neceso organizi ĝeneralan asembleon verŝajne printempe.

X.D. subtenas la sugestojn de X.V. kaj D.T., kaj proponas, ke la federacia kongreso kun pli ampleksa distra programo okazu en oktobro (antaŭ la reveno de la vintra horo), tiel ke ĝi ne plidensigu la printempan periodon de diversaj kongresoj (landaj k.a.).

3. Stato de niaj kluboj

X.V. klarigas ke la Dunkirka klubo malaperos pro manko de membroj. Restas du aŭ tri personoj.

Al niaj klubaj kunvenoj venas malmulte da homoj. X.D. klopodos ion fari por alproksimigi diversajn gejunulojn el Lillo al la klubo LVE.

Ĉar nia federacia bulteno, *La Norda Gazeto*, ne plu aperos, ni klopodos tamen aperigi informilon. Xavier Dewidehem, Cyrille Decouture, Catherine Lévêque, kaj Katja Boen ŝatus labori pri tio. Povus esti 2-paĝa informilo (X.D. proponas la nomon *La Norda Kuriero*) kiu aperos kiel PDF kaj kiun oni printus nur por tiuj kiuj ne havas retaliron.

X.D. indikas, ke estus bone ankaŭ renovigi la federacian retejon, ekz. per kunlaboriga sistemo por ke kelkaj povu facile ĝisdatigi la retejon.

Didje sin prezentas. Li organizas kurson en Bulonjo-ĉe-marĉo kaj ofte vizitas la *Café Polyglotte* kie grupeto babilas en Esperanto. Li kreis la retejon de Bulonjo kaj fariĝis sekretario de Boulogne-Espéranto (Marie-Jeanne Liné plu estas prezidanto kaj Jeanne Bigand estas la kasisto).

La kunveno fermiĝas pro manko de tempo, kvankam restas pluraj diskutendaj aferoj.

Gravaj aldonoj al la protokolo (informis Arlette Plutniak)

1) Sabaton matene, nia komitatkunsido ne daŭris sufiĉe longe por paroli pri la solidareca kaso, kiun tre afable Francine Longue-Épée nutris dum pluraj jaroj per siaj belaj akvareloj. Dankon al ŝi pro sia sindonemo!

En ĝi restis de la antaŭaj jaroj: 175€, el kiuj ni uzis 40€ por monhelpi klubaninon el Arraso, kiu partoprenis kaj povis pagi nur 25€; do restis 135€.

Dum tiu semajn-fino la vendo de akvarel-poŝtkartoj donis pliajn 102,50 €; Tiu kaso entenas nun 237,50€. Ĉar Edmond kaj Arlette decidis ĉesigi la organizadon de la Eŭropa Rendevuo, ili redonos tiun sumon al la Norda Federacio.

2) Fine de la aranĝo en Stella-Maris, (multaj homoj ne povis resti ĝis la fino de la staĝo), kiam Arlette kaj Edmond Plutniak publike anoncis ke ĉi tiu estas la lasta seminario en Stella-Plage, estis granda ŝoko, kaj multaj partoprenantoj reagis por diri kiom ili bedaŭras tion. Antaŭ la foriro, Roch Jullien (arasano, gvidanto de la danc-ateliero) diris, ke li pretas daŭre organizi tiun renkontiĝon. Pagante la restadon al la feriestro li rezervis la datojn por la venonta jaro: 19-20 de Novembro 2016. Estas la miraklo de la tago! Do ni devos dum proksima kunveno de nia komitato pripensi la estontecon kaj organizi ĝin.

(Roch Jullien estas malnova esperantisto, profesie ekonomo de gimnazio)